# Jen lumo ĉiela

## M: ES BLÜHEN DIE MAIEN




2. Hodiaŭ karniĝis
la Vorto inter ni,
kaj Dio homiĝis,
ke l' hom' fariĝu Di'.
Hodiaŭ malplenigis sin
la Dia Fil' por savi nin.
La flamo de l' amo
brulu nun en nia kor'.
Responde al la Di-favor'
sonu laŭd' kaj glor'.

3. Vin laŭdu la perloj
per eta milda bril'.
    Vin benu la merloj
    per triloj de jubil'.
Vin gloru ĉia muzikil',
tamburo, ŝalmo, sak-fajfil';
koloroj, odoroj;
ĉio bona sur la ter'
kaj ĉio en ĉiela sfer',
maro kaj river'.

JEN LUMO ĈIELA • M (Es blühen die Maien): tirola popolkanto • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2018-01-07

*Luk 2,1ss; Joh 1,14; Flp 2,6-7*
*mortalo = mortideva homo (PIV)*

*La tria strofo estiĝis el la plezuro ludi per rimoj kaj sonoj. La ĝuo pri tio eble kreskigos pliajn tiajn strofojn. – Ĉu fare de vi?*